

Por formale trakti gramatikajn fenomenojn de internaciigo necesas klasi ilin en formo, kiu ne dependas de iu(j) lingvo(j). Eble por tio povas utili projektoj pri ponto-lingva maŝina tradukado, ekzemple DLT (vd. *Schubert* 1988) kaj UNL (vd. *Hong & Streiter* 1999 kaj *Delbecq* 1998); ili jam faris tian klasadon en komputile uzebla formo. Ambaŭ ĝis nun ne estas praktike aplikataj por tradukado; eble ili povus utili sur la kampo de internaciigo.

## 5. Referencoj

*Jonathan E. BALE, Harry E. KELLOG*: Native Language Support for Computer Systems. En: Hewlett-Packard Journal, junio 1985, 27-32.

*Sean M. BURKE, Jordan LACHLER*: Localization and Perl: gettext breaks, Maketext fixes. En: The Perl Journal (13), 1999.

*Denis DELBECQ*: UNL, un espéranto pour le Web. Le Monde Interactif (1998-11-07, daŭrigo 1998-12-06).

GNU gettext utilities (programista manlibro), 2002, <http://www.gnu.org/software/gettext/manual/>

*Munpyo HONG, Oliver STREITER*: Overcoming the Language Barriers in the Web: The UNL-Approach. En: Multilinguale Corpora: Codierung, Strukturierung, Analyse. II. Jahrestagung der Gesellschaft für Linguistische DatenVerarbeitung. *Jost GIPPERT* kaj *Peter OLIVIER*, Enigma Corporation 1999, Prago, Ĉeĥio.

Guide to the Qt Translation Tools. Trolltech, 2003. <http://doc.trolltech.com/3.1/linguist-manual.html>

*Klaus SCHUBERT*: The architecture of DLT – interlingua or double direct? En: *Dan MAXWELL, Klaus SCHUBERT, Toon WITKAM* (kompilintoj), New Directions in Machine Translation. Foris Publication, 1988, Dordrecht, Nederlando.

*Lukáš TINKL, Matthias KIEFER, Gary CRAMBLITT*: KDE Programmer's i18n howto. Versio 3.3, 2006. <http://developer.kde.org/documentation/library/kdeqt/kde3arch/kde-i18n-howto.html>

## Adreso de la aŭtoro

OProf. Dr. Reinhard FÖSSMEIER  
Rahel-Straus-Weg 19  
DE – 81673 München / GERMANIO  
<reinhard@foessmeier.name>


## Priaŭtoro informo

La aŭtoro estas komputilisto ĉe firmao *Sofitlab GmbH* en Munkeno kaj instruas informadikon kiel honora profesoro de Universitato *Lucian Blaga* en *Sibiu-Hermannstadt* kaj ĉe Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. Krome li estas senata sekretario de AIS San Marino.

## Lingvopolitikaj scenaroj en Eŭropa Unio

– Komento al *François GRIN* –

*Johan H. DERKS*



## La angla lingvo en la natursciencoj

Multaj aŭtoroj jam atentigis pri la giganta progreso de la angla lingvo en la lastaj okdek jaroj. En la pasinta jaro *Vergara* (2006a) kolektis specifan materialon pri la penetrado de la angla lingvo en la kampon de la sciencoj.




Fig. 1: Evoluo de la uzado de grandaj lingvoj en la natursciencoj laŭ *Ammon & Dittmar* (2006)



La evoluo en la natursciencoj estas pli akcentita ol en aliaj kampoj. Ekde la fino de la 19a jarcento natursciencistoj sin renkontis pli ofte ol iam antaŭe, precipe en internaciaj kongresoj, kiuj nombris en 1900 jam ĉirkaŭ 30 jare. Pli poste multobligis internaciaj projektoj de esplorado, ekzemple de la oceanoj, konstelacioj ktp. Ankaŭ registaroj komencis kunlabori por studi mondajn problemojn sur ekonomia, demografia kaj sociala terenoj. Kaj la plej novdata evoluo estas la eblo komuniki pere de la tuttera teksaĵo. Tio per si mem kreis novajn projektojn, ekzemple en meteorologio, medicino kaj biologio.

Dum en la 19a jarcento la franca, la angla kaj la germana ankoraŭ estis egalecaj rivaloj, post la unua mondmilito ekestis malkreskego de la germana, kreskego de la angla, al 91%, kaj emerĝo de la japana.

Ĝuste en tiuj natursciencoj ankaŭ sentigis sin la bezono je penŝpara neŭtrala lingvo. Vergara (2006b) citas Wilhelm Ostwald, nobelpremiito pri ĥemio, kiu diris antaŭ cent jaroj: "El la komunaj posedaĵoj de la homaro, neniuj estas tiel vere universala kaj internacia kiel la scienco. Kiom granda kvanto da laboro povus esti ŝparata, se libroj ĉie en la mondo povus esti tiel ĝenerale komprenataj kiel ekzemple la muziknotoj aŭ logaritmaj tabeloj". Ostwald estis idisto kaj varbis en tiu maniero por Ido, varianto de Esperanto.

Malgraŭ la evidentaj avantaĝoj de neŭtrala lingvo super la lernado de ajna nacia lingvo, tiu idealo ne realiĝis. La argumentojn ĉiu matura esperantisto jam konas, sed ili ĝenerale neniom interesas modernajn homojn. Prospera homo ne havas grandajn sociajn idealojn. Ĝi postkuras sian individuan materian bonfarton kaj ne ekscitiĝas pri la bela panoramo, kiun lingva solidareco prezentas.

### Esperanto en la raporto de François Grin

Miriga incidento nun okazis, ke sciencisto, kiu plene konscias pri tiu individuismo de la okcidenta homo kaj pri la manko je solidareco en internacia politiko, faris studon en kiu li esploras i.a. ankaŭ la eblon instrui Esperanton en la lernejoj de la tuta Eŭropa Unio. La studo nomiĝas "*L'enseignement des langues étrangères comme politique publique*"<sup>(1)</sup> ("Fremdlingvo-instruado kiel publika politiko") kaj estas tradukita en la ĉefan, portugalan, nederlandan kaj Esperanton.<sup>(2)</sup>

Tiu aŭdaca sciencisto estas profesoro François Grin, ekonomikisto pri lingvoj, do li baziĝas grandparte sur nombroj, financaj valoroj, kaj sur certaj juraj principoj de egaleco, sen povi mezuri – li daŭre sub-

strekas tion – la gravajn 'simbolajn efikojn', kiujn havas la uzado de neŭtrala lingvo.

La svisa profesoro prezentas tri scenarojn, laŭ kiuj ĉiuj civitanoj de EU lernu du fremdajn lingvojn, konforme al la hodiaŭa oficiala rekomendo de EU. La unua scenaro estas la akcepto de la angla kiel unu el la du devigaj lingvoj, en ĉiuj lernejoj, dum la alia estas libere elekt-ebla. La dua scenaro enhavas la akcepton de tri ĉeflingvoj, kiuj inter si estos egalaj kaj du el kiuj ĉiuj eŭropanoj<sup>1</sup> devos regi. Tio estas la scenaro de 'multlingvismo', kvankam laŭ ĝi grava maljusto estos farita al pli ol duono<sup>2</sup> de la eŭropa loĝantaro, kiu ne denaske parolas iun el tiuj ĉefaj lingvoj. Ja la tri ĉeflingvoj supozeble estus la franca (F), la germana (G) kaj la angla (A).

Pli ĝuste estus paroli pri trilingvismo, kvankam Grin preskribas, ke denaske parolantoj de F, G aŭ A lernu – krom unu alia lingvo el la triopo – ankaŭ unu neprivilegiitan lingvon. La tria scenaro estas la deviga instruado de Esperanto al ĉiuj civitanoj de EU kaj de unu alia, libere elekt-ebla lingvo.

### Modelo de disvastiĝo de lingvo en grupoj

Por havi bildon de tio, kion alportus al ni la akcepto de la tut-angla scenaro, ni konsideru, kiuj jam nun estas la konsekvencoj de la angla-lingva dominado.

La leganto eble memoras, ke en la Esperanta kaj franca gazetaraj, interalie frontpaĝe en "*Le Figaro*", aperis (junio 2005a) mencio de tio, ke la hodiaŭa plifavorado al la angla super aliaj lingvoj kostas al la landoj de la malnova Eŭropa Unio ĉiujare la sumon de inter 17 kaj 18 miliardoj da eŭroj.

Tiu sumo unupartite konsistas el pagoj por produktoj kaj servoj, kiuj rilatas al la favorado al la angla, aliparte el la nereкта profito por Britujo, ĉar ĝi povas investi grandajn ŝparatajn sumojn en sian ekonomion.

Por distingi la kaŭzojn de tiu malegaleca situacio, ni nin demandu ĉu ekzistas kondiĉo pro kiu ĝuste en la natursciencoj, kiel ni vidis supre, la progreso de la angla estas plej akcentita? Verŝajne jes. Tiu

<sup>1</sup> Kutime, kie paroliĝas pri Eŭropo, eŭropanoj ks, mi celas (loĝantojn de) EU en 2006, do ekskludiĝas Islando, Norvegujo, Svislando, Rumanujo, Bulgarujo, Serbujo, Montenegro, Makedonujo, Kroatujo kaj la landoj de la antaŭa Sovet-Unio.

<sup>2</sup> 51,5% laŭ EU "*Eurostat*" en 2004



fako de homa interagado havas esence kunlaboran, kolektivan, sci-interŝanĝan karakteron trans la naciaj limoj. Ĉar sciencistoj estas dividitaj laŭ fakoj (kaj tiuj denove laŭ specialismoj) ili ĝenerale renkontas sin en grupoj de preskaŭ sama konsisto. Tiu kondiĉo plejmulte validigas la procezojn de “minimaksigo” kaj “uzebleco”, kiujn priskribas *Grin*.

Kio estas minimakso kaj minimaksigo? Se iu angle parolanto vizitas vian germanlingvan hejmon por partopreni la tagmanĝon kaj viaj familianoj ĉiuj parolas iomete (eĉ se balbute) la anglan, vi elektos la anglan kiel lingvon de konversaciado. Tio avantaĝos la spertulojn pri la angla lingvo ĉirkaŭ la tablo, sed la alternativo estus, ke via gasto, kiu komprenas nenion pri la germana, ne povus partopreni la interparoladon. Resume: pli bone ĉiuj povu almenaŭ minimume partopreni ol unu neniom partopreni. Tiel ĉetable vi maksimumigas la minimumon, vi “minimaksigas”.

La belga socilingvisto *Philippe van Parijs* kreis tiun matematikan modelon por priskribi la manieron laŭ kiu grupoj ĝenerale elektas inter si la lingvon parolotan. Ofte en internaciaj grupoj la minimakso estas nulo: kiun ajn lingvon oni elektus, ĉiam estas personoj, kiuj komprenas nenion. Tiam, laŭ *van Parijs*, oni unue limigas sin al tiuj lingvoj komprenataj de maksimumo da personoj aŭ, en liaj vortoj, oni “minimumigas la ekskluzivon”.

Kio estas ‘uzebleco’? La fakto ke oni akceptas en unu, du, tri k.t.p. okazoj certan lingvon X, estas forta instigo al la partoprenantoj lerni tiun lingvon X. Se efektive iuj homoj lernas ĝin, la nombro da parolantoj, kun kiuj oni povos ĝin uzi, kreskas. Konsekvence la lingvo X pli ofte (almenaŭ en tiu rondo de specialistoj, kiuj regule renkontas sin) troviĝos en taŭga situacio por garanti tiun faman minimakson. *Van Parijs* nomas tiun lastan mekanismon la “principo de uzebleco”.

La plej grava trajto de la modelo de *Van Parijs* estas, ke li analizas la disvastiĝon de lingvo kiel fenomenon primare okazantan en fiksitaj grupoj, kies membroj regule renkontas unu la alian, pro sameco de profesio, komuna interesiĝo, hobbio aŭ sporto, geografia apudeco aŭ ekonomia avantaĝo. Tamen grupoj ĝenerale ne estas tiel fiksitaj. Se vere ĉiu eŭropano komunikas dum sia tuta vivo nur en malgranda difinita cirklo, la komunikada problemo estus simple solvebla: instru en la lernejoj po unu fremdan lingvon laŭ la plimulto de ĉiu grupo, en kiu la lernanto vivos sian vivon.

Kiu matematika modelo aplikiĝas, se la grupo ne estas fiksitaj? *Grin* donas la sekvantan ekzemplon, elirante de la supozo, ke ene de la 5 grandaj eŭropaj institucioj la oficistoj renkontas unu la alian en grupoj tute laŭ hazardo. En tiuj institucioj laboras pli ol 30 mil oficistoj.

Imagu, ke inter ili oni estas establita triopano multlingvismon, t.e. laŭ lia difino, ke ĉiuj oficistoj bone regas du lingvojn el tiu triopo: la anglan kaj la francan aŭ la germanan kaj la anglan aŭ la francan kaj la germanan. Tio signifas, ke ĉiu grupo de du oficistoj povas interkompreniĝi per iu el la tri privilegiitaj lingvoj. Se la grupo estas triopa, jam povas okazi, ke ĝi ne sukcesas interkompreniĝi:

Oficisto	Kono de la		
	Franca	Germana	Angla
<i>Evald Johanson</i>	ne	jes	jes
<i>Stanislaw Cielecka</i>	jes	jes	ne
<i>Xavier Hernandez</i>	jes	ne	jes

Tabelo 1: Malinterkompreniĝo inter tri oficistoj




Fig. 2: Ŝanco je interkompreniĝo laŭ nombro da oficistoj



La probablokalkulo lernigas al ni, ke la ŝanco je tiu okazo estas 22% ( $\frac{2}{9}$ ). Kompreneble tiu ŝanco rapide kreskas laŭ la nombro da interparolantoj. Se oni organizas labordiskutkunvenon inter dudek oficistoj, laŭ hazardo elektitaj el tiuj 30 mil, la ŝanco, ke ĉiuj dudek komprenos la francan, aŭ la germanan aŭ la anglan estas malpli ol 0,1%. (RG, p.80).<sup>3</sup>

Oni povas mildigi tiun malkontentigan rezulton en pluraj manieroj. Ekzemple postulu, ke ĉiuj oficistoj regu unu lingvon el la triopo aktive kaj la du aliajn lingvojn pasive. Tio tamen signifas, ke ili ne povas aktive kontribui al la diskutado, se la alprenita lingvo ne estas ilia denaska.

### Konkludaj pensoj pri lingva strategio en Eŭropa Unio

Tiu ekzemplo lernigas al ni du aferojn. Unue, ke la utileco de triopa multlingvismo estas tre limigita, almenaŭ se oni supozas, ke la konsisto de kunvenoj inter ekz. oficistoj de Eŭropa Unio estas pure aleatora, t.e. laŭ hazardo. Do la interpretadaj kaj tradukadaj servoj restos ĉiam ege gravaj por helpi funkcii la eŭropajn instituciojn.

Due ĝi lernigas al ni, ke por atingi pli bonan interkompreniĝon, oni konsideru en kiuj manieroj oni povas mastrumi la konstituiĝon de laborgrupoj k.s. laŭ lingvoj. Ne regu la hazardo. *Grin* aplikas tiun ideon de mastrumado de la renkontiĝoj en grupoj ankaŭ al la loĝantaro de Eŭropo. Li proponas speciale instigi al la lernado de la lingvoj de gravaj ekonomiaj kaj kulturaj partneroj – okaze de Francujo, de la germana, la hispana kaj la itala.

*Grin* ankaŭ mencias ideon de la lingvistino *Françoise Ploquin* (RG, p.70-71) kuraĝigi plurlingvecon<sup>4</sup> strukturitan ĉirkaŭ la tri lingvaj familioj en Eŭropo: la slava, ĝermana kaj latinida familioj. Do nederlandanoj lernu pli la germanan lingvon kaj inverse, ĉeĥoj la polan, kroatoj kaj serboj la ĉeĥan ktp, ĉar almenaŭ tio kostas malpli da lerninvestado. Nur hungaroj, finnoj, baltoj kaj eŭskoj estas lasataj solaj, ĉar ili ne apartenas al unu granda lingva familio.

Ĉi tie mi devas fari flankan rimarkon. En la raportado de la Esperanta gazetararo pri la studo de *F. Grin* aperis gravaj misinformoj. An-

<sup>3</sup> RG = Raporto de *Grin*

<sup>4</sup> Estas bonaj motivoj por vortume diferencigi inter **plurlingveco**, la fenomeno, ke homo parolas plurajn lingvojn, kaj **multlingvismo**, laŭ kiu en institucio oni reglamentadas la uzadon de pluraj lingvoj.

koraŭ nun oni povas legi en interreto<sup>(3)</sup>, ke *Grin* starigis la demandon "Kiu estus la optimuma elekto pri la laborlingvoj en Eŭropa Unio"? Estas nekompreneble, ke en dokumento, pri kiu Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) portas unuan respondecon, oni tute miskomprenas la signifan vastecon de la raporto *Grin*. Esence ne temas en ĝi pri nur la laborlingvoj en la eŭropaj institucioj, sed pri fremdlingvo-instruado al la civitanoj en ĉiuj landoj de EU!

Alia afero estas la aserto de *Grin*, ke la registaroj devos interkonsenti pri reglamentado de la laborlingvoj (RG, p.67) de la Unio por kredindigi la multlingvismon, kiun Eŭropa Unio ja oficiale favoras. En tiu rilato li havas drastajn proponojn; li specifas interalie, ke dokumentoj kun oficiala karaktero, kiuj koncernas civitanojn de Eŭropa Unio, ekzemple dunoofertoj de la Komisiono, povus ĉiujare esti eldonitaj en malsamaj lingvoj, tiel ke ekzistos laŭvicigo de lingvoj, kiu regule ekskluzivu la dominajn lingvojn, tiel la anglan kiel, laŭ la jaroj, ankaŭ la francan (RG, p.68).

Ĉar reglamentado de la laborlingvoj koncernas la efektivigadon de multlingvismo en la organoj de Eŭropa Unio mem, ĝi refalas sub la kompetenton de Eŭropa Komisiono kaj tiu Komisiono estas multe pli konscia pri la eŭropaj valoroj – inter kiuj multlingvismo – ol la membroj-registaroj. Ĉar la estraro de EEU enfokusigas la eŭrop-diplomatan nivelon, ĝi faras tiun misan joron. Tio ne forviŝas, ke rekono de Esperanto fare de EU kiel eŭropa lingvo (kaj eble iam kiel laborlingvo) estas unuaranga temo.

Cetere ĝi ne povas esti efektivigita de EEU sola. Mi volas doni ekzemplon pri tio, kion nuntempe privata agado povas atingi ĉe oficialaj organoj de Eŭropa Unio. En *Graz*, Aŭstrujo, situas la Eŭropa Centro de Modernaj Lingvoj. Tiu Centro realigas la agadojn okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj. Tiu tago estas la 26-a de septembro, precipe por atentigi la ĝeneralan publikon pri la graveco de lingvo-lernado. La retejo<sup>(4)</sup> sub redaktado de *Katalin Kováts*, en la somero 2006-a organizis kampanjon en la reto por mobilizi retemulojn montri, kiel Esperanto povas esti ponto inter kulturoj. Ili estis invititaj fari en Esperanto iun instruon pri sia lingvo. Tiu agado konvinkis la aŭtoritatojn de la Centro kaj kondukis al akcepto de Esperanto en la paĝaro, kiu informis la eŭropan publikon pri la Eŭropa Tago de Lingvoj.<sup>(5)</sup>

*Katalin Kováts* (2006)<sup>(4)</sup> skribis tiukaŭze: "Ni opinias la atingiĝon granda paŝo antaŭen sur la vojo de oficialigo de Esperanto ĉe polit-



ikaj stancoj. Ni havas ĉiujn bazojn por vere celebri la Tagon de Lingvoj". Ŝi donas imitendan ekzemplon, ĉar laŭ mia forta opinio nur tra la perdo de konfirmo de la egaleco de ĉiuj lingvoj ni povos atingi rekonon de Esperanto flanke de Eŭropa Unio. Tio do signifas, ke esperantistoj de la hodiaŭa generacio ne frapu la bruston pri tio, ke Esperanto pli valorus ol ĉiuj aliaj lingvoj en Eŭropo. Jam la konstato (fare de la aŭtoritatoj) ke Esperanto estas vivanta lingvo kaj ne iu projekto, estus granda atingajo.


Tio havas konsekvencojn. Fanatikaj esperantistoj emas fari kontraŭefikan propagandon. Tiuj 'talpoj' <sup>(6)</sup> ek zemple asertetas, ke en Eŭropa Unio la lingva *problemo estas tiel granda, ke ĝi ne povos pluekzisti sen komuna lingvo, ke Esperanto havas nur unu konkuranton, la anglan lingvon, kaj ke la movado venkos tiun lingvon, se ni amase eklernos ĝin. Ene de dudek jaroj Eŭropa Komisiono proklamos, ke en ĉiuj lernejoj de EU Esperanto estu devige instruata.* Se ni kondutos tiel, eble ni varbos kelkajn simplulojn, sed pli edukitaj homoj komprenos, ke laŭ ni lingvoj ne estu egalaj kaj eĉ ili povus timi, ke esperantistoj alstrebas anstataŭigi la naciajn kaj regionajn lingvojn, kiel nun faras la angla.

*François Grin* (RG, p.102) mem skribas laŭvorte: "En la proksima tempo, tamen la scenaro 3 ne estas antaŭvidebla; eĉ la nura anonco, ke tia scenaro devus esti konsiderata en la limo de 20 aŭ 25 jaroj, estus ridigita de grandaj partoj de la publiko, ĉar tiom forta estas la kredo, ke ekzistas neniu alternativo al la hegemonio de la angla. Ĉiu forgesis, ke multaj ŝtatoj subtenis – je la epoko de la Ligo de Nacioj – la alprenon de Esperanto kiel internacia lingvo, aŭ ke la plenkunsidoj de UNESKO adoptis, en 1954 kaj en 1985, rezoluciojn favore al Esperanto" (RG, p.102). Kaj plue li skribas: "En mallonga aŭ meze longa tempolimo, la scenaro 2, t.e. tiu de «plurlingvismo» estas preferinda, nur ĉar ĝi ĝuas pli grandan politikan akcepton" (RG, p.7).

### Britujo kaj Eŭro profitas je miliardoj

Al ambaŭ scenaroj, tiu de triopa multlingvismo kaj tiu de la tutesperanta scenaro, apartenas propra ekonomia argumentado. Kiu argumentado pledas por la triopa multlingvismo? Ĉu la egaligo de la franca kaj germana lingvoj al la angla rezultigos grandajn ekonomiajn efikojn? Por scii tion ni unue kalkulu kiun profiton Britujo kaj Eŭro nuntempe ĉerpas pro la hegemonia pozicio de la angla lingvo. Tiu profito venas el la sekvantaj tri fontoj:

La unua fonto, privilegiitaj merkatoj, estas la elspezoj fare de eksterlandanoj por aĉeti britajn produktojn kaj servojn. Ĉiujare 700 mil eksterlandanoj vizitas Britujon por plibonigi sian sci-povon de la angla lingvo.



"A multilingual Community at work", 2001, prezenta broŝuro de la Tradukservo, citita en "Ĉu nur-angla Eŭropo?" p.133

Ankaŭ la elspezoj kiujn eksterlandanoj faras por aĉeti librojn, kodiskojn ktp pri la angla lingvo, sumiĝas je 800 milionoj da britaj pundoj ĉiujare. Sur tiu merkato de lernolibroj kaj lernrestadoj la angla lingvo estas forte privilegiita. Aliaj landoj ricevas multe malpli da interesiĝo pri sia lingvo ol Britujo. La diferenco inter la veraj elspezoj fare de eksterlandanoj por lingvovizitoj kaj lernmaterialoj kaj la sumo, kiun eksterlandanoj elspezus, se la angla havus statuson proporcion al la angleparolantoj, estas 1875 milionoj da eŭroj.

Plue *Grin* taksas surbaze de publikigaĵo de *Phillipson* (2003)<sup>5</sup>, ke pro tiu impulso al la Brita ekonomio ĝi plikreskas ankoraŭ per 6750 milionoj da eŭroj, la t.n. "obligata efiko". La dua fonto, "ŝparo en la instruado de fremdaj lingvoj", koncernas la elspezojn, kiujn en ne-anglalingvaj landoj oni devas fari pli por instrui la anglan lingvon ol estus normale. La tria fonto, "ŝparo de peno por tradukado kaj interpretado", estas la elspezoj, kiuj estas necesaj por traduki kaj interpreti anglajn tekstojn al aliaj lingvoj kaj inverse pli ol estus normale.<sup>6</sup>

FONTO	Rekta sumo x 10 <sup>6</sup> eŭroj
Privilegiitaj merkatoj	1 875
Ŝparo en la instruado de fremdaj lingvoj	6 000
Ŝparo de peno por tradukado kaj interpretado	2 200
<b>Totalo</b>	<b>10 075</b>

Tabelo 2: Rektaj profitoj el EU-landoj al Britujo/Ejro

La totalo de pli ol dek miliardoj da eŭroj ne estas la tuto, kiom Britujo profitas pro la statuso de la angla. Ĉar estas tiel, ke la totala sumo, elspezita fare de ne-britoj sur tiuj tri frontoj, kaŭzas aliajn ekonomiajn aktivadojn en Britujo: oni devas konstrui restadejojn por eksterlandanoj, aĉeti maŝinojn por presi la librojn ktp. Ankaŭ la sumo de ses miliardoj da eŭroj, kiun oni elspezas en Britujo malpli ol en aliaj landoj por la instruado de fremdaj lingvoj, estas ŝparaĵo, kiu povas

<sup>5</sup> *Phillipson* (2003) citas la Britan registaron, kiu raportis en 2001, ke la angla lingvo ĉiun jaron «enspezigas» al la ŝtato 15,2 miliardojn da eŭroj. Enkalkulante la kreskon de la ekonomio en tri jaroj, la supozeblan parton, kiun okupas la landoj de EU en la "lingvo-ekonomio" de Britujo, kaj subtrahante la parton de tiu ekonomio, kiu estas normala (laŭ la granda de la Brita loĝantaro), *Grin* atingas 6,75 miliardojn da eŭroj, ĉiujare.

<sup>6</sup> La tut-unia merkato de tradukado kaj interpretado ampleksas laŭ *Grin*, 5515 milionojn da eŭroj (RG, p. 86). El tio Britujo kaj Ejro enspezigas al si minimume 41% pli ol estus 'juste' (13,9%),  $5515 \times 0,41 = 2261$

esti investata. Simile pri la ŝparaĵo pro malpli da elspezoj por salajroj de interpretistoj kaj tradukistoj. Ekonomikistoj nomas tiun fenomenon de kreado de nova aktiveco la obligata efiko. *Grin* kalkulas tiun obligan efikon esti inter 5,7 kaj 7,3 miliardoj da eŭroj en la jaro 2004.

Tiel la totala kresko de la ekonomio por Britujo kaŭze de la hegemonia statuso de ĝia lingvo ĉiujare estas ne dek miliardoj, sed proksimume 17,4 miliardoj da eŭroj. Se oni aldonas la profiton por Ejro pro ĝia avantaĝo sur la privilegiitaj merkatoj (RP, p.83, piednoto 65), inkluzive de la obliganta efiko, kaj pro ŝparo en la instruado de fremdaj lingvoj, oni atingas proksimume  $(1875+7300+6000) \times 1,066 + 2200 = 18\,377$  milionoj. Tio egalas al 1% de la Brita kaj Ejra ekonomioj.

### Kalkulo de malprofito por ne-angle parolantaj landoj

Oni povas taksu kiom ĉiuj unuopaj landoj de Eŭropa Unio kontribuas al la Malneta Enlanda Produktaro (MEP) de Britujo kaj Ejro<sup>(5)</sup> (vd. la nigrajn kolonojn de la Fig. 3). Tie vi legas, ke la hegemonia statuso de la angla kostas al ĉiuj membro-landoj de Eŭropa Unio 0,16 % de iliaj respektivaj Malnetaj Enlandaj Produktaroj.

Elcento de dokumentoj en / al la	proponitaj por traduko en	tradukitaj al
angla	55	11
franca	33	13
germana	4	13
itala aŭ hispana	8	18
nederlanda, greka aŭ portugala		24
dana, sveda aŭ finna		21
Totalo	100	100

Tabelo 3: Indikoj (kol. 2) pri domino de la lingvo



Por kalkuli tion mi faris kelkajn ege malfajnajn, malprecizajn supozojn. Unue mi malatentis, ke la “lingvujoj” (t.e. la geografiaj regionoj, kie oni parolas unu saman ĉeflingvon) ne ĉie kongruas kun la landoj. Nur Belgion mi dividis en la nederlandlingvan Flandrujon kaj la francalingvan Valonujon. Due, mi supozis, ke ĉiuj membrojlandoj havas saman nivelon de riĉeco. Tio estas pli aŭ malpli ĝusta por la 15 malnovaj membroj de EU. Ĝuste tial en Fig. 3 (p. 179) mi ne prezentis la novajn membrojn de Eŭropa Unio. Trie, mi supozis, ke el landoj foraj de Britujo lernemuloj de la angla lingvo en samaj proporcioj vojaĝas al Britujo (aŭ Eŭro) por lerni la anglan aŭ aĉetas britujdevenajn lernolibrojn kiel el proksimaj landoj. Kvare, mi supozis, ke la kosto de lernado de la angla por individuo en ĉiuj landoj estas simila. Kvine, mi supozis, ke aliaj lingvoj ol la angla estas egalaj laŭ statuso. Tio klare ne ĝustas, ĉar ene de la Eŭropa Komisiono la franca kaj la germana estas laborlingvoj kaj tio reflektas la situacion, ke en Eŭropa Unio ili ĝuas pli altan statuson kaj estas grave favorataj.

Broŝuro de la Tradukservo de la Eŭropaj institucioj montras, ke en 2004 la nombroj da dokumentoj prezentataj por tradukado rilatis unu al la alia kiel vi vidas en la Tabelo 3. Tiuj ciferoj estas indiko por tio, ke la franca lingvujoj estas forte privilegiita, ĉar la elcentaĵo de francparolantoj al la tuta enloĝantaro de EU estas multe malpli (14,5 %) ol 33, sed la germana (19,9 % de la EU-loĝantaro) estas malprivilegiita (vd. ankaŭ la piednoton 11).

Certe Francujo perlaboras monon el la landoj kun malpli privilegiitaj lingvoj. Ankaŭ ĝi havas profitigan merkaton de lernolibroj, oni loĝigas lernemulojn de la franca kaj Francujo ne bezonas tiom elspezi por lingvolernado kiom en aliaj landoj, kie oni bezonas scion de la angla kaj de la franca por povi rilati kun eksterlando.<sup>7</sup>

Ĉu mi enias la privilegion, kiun la franca lingvo havas super ekz. la nederlanda? Por respondi al tiu demando necesas pliprofundigi en la simbolaj efikoj de tiu privilegio. Mi rimarkigu unue: se sub gvido de la franca kaj germana politikoj oni sukcesus en Eŭropa Unio kurbigi la hegemonion de la angla lingvo, tio estus politike grava avanco. Ĉar ne nur temas pri *financa* malprofito kiu ŝarĝas la landojn en Eŭropo; ankaŭ la angla lingvo kuntrenas *ekstereŭropan*, por esti klara:

<sup>7</sup> Se vi interesiĝas pri tiu komparado de elspezoj: en Francujo oni elspezis en 2004 € 137 por enloĝanto pri lernado de fremdaj lingvoj. En Nederlando la sama monsumo estis proksimume € 260!




Fig. 3: Kreskoj en miliardoj da eŭroj el/al ĉies Malneta Enlanda Produktaro (MEP) laŭ scenaro 1 kaj 2



usonon, kulturon. La franca kaj la germana lingvoj laŭ mia penso reprezentas multe pli aŭtentike ol la angla, la kulturon de Eŭropo.

Profesoro *Grin* pledas por establado de tiu privilegia pozicio de la franca kaj la germana lingvoj, kvankam teorie li estas malferma ankaŭ al alia triopo de Eŭropaj lingvoj. La financa malegaleco inter la parolantoj de ne-privilegiitaj lingvoj kaj tiuj de privilegiitaj lingvoj tiam verŝajne fariĝus malpli granda, ĉar laŭ miaj kalkuloj ĉiu lando kie oni ne parolas la germanan, la francan aŭ la anglan malprofitus je minimume 0,13 % de sia Malneta Enlanda Produktaro (vd. la haĉitajn kolonojn de Fig. 3).

Por kalkuli tiun elcentaĵon mi konsideras kvar landogrupojn en la EU de 25 membroj:

1. Britujon kaj Ejon kun 59,22 milionoj da loĝantoj
2. la landojn, kie oni parolas la francan, la germanan aŭ la anglan: Francujo, Valonujo, Luksemburgio, Germanujo, Aŭstrujo, Britujo kaj Ejo.<sup>8</sup> La sep FGA-landoj enhavas kune 219,4 milionojn da loĝantoj, t.e. 3,705-oble de loĝantoj de Britujo.
3. la landojn, kie oni ne parolas la francan, germanan aŭ anglan lingvojn<sup>9</sup>. Ili konsistigas 51,5% de la tut-unia enloĝantaro kaj 60,1% de la ne-angleparolantoj en EU. Mi nomos ilin la ne-FGA-landoj.
4. la dek landojn en 2004 aliĝintajn al EU. Ili havas totalan loĝantaron de 74,1 milionoj, t.e. 16,3% de la EU-loĝantaro (sen Bulgarujo kaj Rumanujo).

Mi nun argumentas, utiligante la supre-menciitajn nombrojn kaj kalkulante en milionoj da eŭroj:

**A.** Laŭ scenaro 2 la nombro da devigotaj lingvoj el la triopo FGA por loĝantoj de la ne-FGA-landoj estus du. Ĉar aktuale ili havas praktike unu devigitan lingvon el la triopo, la anglan,<sup>10</sup> ili devas duobligi siajn

<sup>8</sup> Mi dubas, ĉu Ejo kaj Luksemburgio plene apartenas al tiu grupo, ĉar verŝajne ekzistas prefero inter fremdlingvolernantoj orientiĝi al landoj, kies lingvo-varianton oni konsideras kiel puran, ekzemplecan. Dume la efiko de ilia ekskludo estus ege malgranda.

<sup>9</sup> = respektive \*francalo, \*germanalo, \*anglalo, per sufikso laŭ Karolo Piĉ, indikante objekton aŭ fenomenon, kiu karakterize havas la eon de la adjektivo.

<sup>10</sup> Ekzistas kelkaj landoj, ekz. Nederlando, Danlando, kie jam du lingvoj el la triopo estas tradicie instruataj. Tiun 'tropezadon' pri fremdlingvinstruado mi tamen ne

elspezojn direkte al la dua grupo! Por denaske FGA-parolantoj unu fremda lingvo el la triopo restas deviga, kiel antaŭe tiu estis praktike la angla, do ili ne bezonas redirekti siajn elspezojn. La tuta cedaĵo sur la "privilegiitaj merkatoj" al la FGA-landoj do povus, unuapense, esti proksimume la duoblo de tiom kiom la ne-FGA-landoj nun cedas al Britujo, t.e.  $2 \times 1875 \times 0,601 = 2254$ . Al tio mi devas fari korekton. Mi rimarkigas, ke la faktoro 1875 estas kalkulita fare de *Grin* kiel la eksceso, 75 %, de 2500, ĉar  $^{55-14}/_{55} \cong 0,75$ <sup>11</sup>.

En tiu frakcio la supernombro estas la diferenco inter la pezo (elcentaĵo) de la angla kiel fontolingvo aŭ cellingvo kaj la pezo de la anglalingva loĝantaro en EU, kiu estus ankaŭ la pezo de la angla, se ĉiuj lingvoj okupus sian justan elcenton en la traduka kaj interpreta merkato. Tamen por la privilegiitaj landoj kune la justa elcento estus 48,5 (= 100 - elcentaĵo de la ne-FGA-landoj), dum ĝia fakta elcento estas 89 (vd. piednoton 11). Tio signifas, ke la ekscesa proporcio nun estas  $^{89-48,5}/_{89} = 0,455$ , kaj ni devas multipliki  $2 \times 2500 \times 1,05 \times 0,601$  per 0,455, kio donas 1435,6.<sup>12</sup> (La samo aplikiĝas por la kresko de la ekonomio pro la ekscesa profito sur la privilegiitaj merkatoj:  $2 \times ^{6750}/_{0,75} \times 1,05 \times 0,601 \times 0,455 = 5168,3$  por Britujo kaj Ejo kune.)

**B.** Pri la ero "ŝparo de peno por tradukado kaj interpretado" la tuta cedaĵo fariĝus  $(0,89-0,485) \times 5515 = 2233,6$ .

**C.** La sumoj sub A kaj B sumiĝas al rekta profito de 3669 kaj plikresko de la FGA-ekonomioj kune je

$$5168,3 + 2233,6 \times 0,07 = 5325.$$

Tio adiciiĝas al 8994 milionoj. Mi intencas rilatigi tiun sumon al la MEP de la dua grupo, la landoj, kie oni parolas france, germane aŭ angle. Ĉar ilia kuna loĝantaro en 2004 nombris 3,705-oblon la loĝantaro de Britujo, mi atingas, supozante, ke la MEP-oj por loĝanto en

enkalkulas, ĉar ĝi estas necese por malferma ekonomio kaj povas esti konsiderata kiel profitodona investo por tiuj landoj, kies profito supozeble kvitigas la tropezadon.

<sup>11</sup> *Grin* citas la organizaĵon OFIL, kiu publikigis en 1999 jenajn "taksadojn fare de Eŭropa Komisiono": La parto de anglalo, kiel fontolingvo kaj cellingvo preterpasus 50%, tiu de francalo atingus 29% kaj germanalo 5%. Por anglalo *Grin* faras el tio 55%. Mi faras  $55 + 29 + 5 = 89\%$  por la FGA-lingvoj kune.

<sup>12</sup> Mi aldonis faktoron 1,05, ĉar *Grin* mem (RG, p.83) sugestas tion por pli ĝuste enkalkuli la profiton por Ejo.



ĉiuj tiuj landoj estas proksimume egalaj (por Britujo:  $1710/59,22 = 28877$  eŭroj), kunan MEP-on por la sep ekonomioj de  $3,705 \times 1710 = 6335$  miliardoj. Tiel la sumo de 8,994 miliardoj egalas al  $8,994/6335 \times 100 = 0,14\%$  de la komuna MEP.

Ĉar tiu sumo estus kunigata ĉiujare de la ne-FGA-landoj, kies MEP por loĝanto mi identigas al tiu de la FGA-landoj<sup>12</sup>, oni povus en tre kruda maniero kalkuli, ke la kontribuado de ne-FGA-landoj al FGA-puraj landoj ampleksas  $8,994/3,971 \times 1710 \times 100 = 0,13\%$  de ilia komuna MEP.<sup>13</sup>




Fig. 4: Nombro da lernintoj kaj nombroj da denaskuloj laŭ scenaroj 1, 2 kaj 3

<sup>12</sup> Tio certe ne validas por la dek novaj membroj de Eŭropa Unio, sed ilia totala loĝantaro estas iom malgranda: 16,3% de la tuta loĝantaro de EU, dum ilia aĉetpovo tiel por mendi lingvorilatajn varojn kaj servojn el la FGA-puraj landoj kiel instrui fremdajn lingvojn estas sufiĉe limigita.

<sup>13</sup> Ĉar la novaj membrandoj havas ĉiuj multe malpli altan MEP por loĝanto, la elcento, kiun ili kunigas al la FGA-landoj povus esti pli ol 0,13%. Alia faktoro kiu influas la elcentaĵon de ilia MEP, estas la elcentaĵo de la ŝtata buĝeto, kiun ili elspezas por fremdlingvolernado.

## Simbolaj efikoj pro lingvaj malrajtoj

Kompreneble la dominado de la angla kaj la franca ne estas nur financa afero. *Grin* ripete mencias la 'simbolajn efikojn', kiujn la procezo de dominiĝo de la angla lingvo kaŭzas.

En esperantistaj rondoj oni ofte mencias krom la komunika valoro de lingvo ankaŭ ĝian identecan valoron. La kvantaj konsideroj de *Grin* ĉefe rilatas al tiu komunika valoro, dum malsamo je identeco ĝenerale havas 'simbolan efikon' kaj refalas sub la "ne-merkataj valoroj" de lingvo. En tio li distingas individuan kaj socian dimensiojn. Pri la individua dimensio li notas (RG, p.24), ke kono de certa lingvo X ebligas aliron al la X-lingva kulturo, faciligas la sociajn kontaktojn kun membroj de la X-lingva komunumo, ktp. Sur la individua kaj la socia niveloj, li atentigas pri la avantaĝo kiun ĝuas denaskaj parolantoj de hegemonia lingvo dum ajna situacio de intertraktado aŭ konflikto okazanta en ilia lingvo (RG, p.7), kaj pri la prestiĝo, kiun donas la disvastigado de alteĥnikaj kaj novmodaj varoj kaj servoj al la lingvo uzata (RG, p.95).

La aŭtoro rezignacias en tio, ke la ne-merkataj valoroj estas nekal-kuleblaj, sed mencias, ke teorie eblas apliki por tio la taks metodojn uzatajn en ekonomio de la vivmedio (RG, p.28). Tiujn taksadojn oni kondukas kiel sumigadon de kvantigitaj individuaj preferoj kaj ili povas rilati al la valoro de diverseco de kulturoj, simile kiel homoj ankaŭ aprezas diversecon de flaŭro kaj faŭno, aŭ al la malavantaĝaj efikoj de lingvopolitiko por la parolantoj de certa lingvo kontraŭe al la avantaĝo por alilingvanoj (RG, p.30): "la ŝarĝo de lerno de la oficiala lingvo refalos sur ĉiujn, kies lingvo ne estos alprenita kiel oficiala lingvo, kune kun la ŝarĝo de adaptiĝo al ties normo (ekstera)."

Tiu lasta okazo estas afero de distribua justeco, por kiu li referencas al la "principo de diferenco" de la usona filozofo *John Rawls* (1921-...). Kiel maltaŭgan metodon por taksi la justecon de iu lingvopolitiko li montras (p.29) la prijuĝadon de instrusistemoj surbaze de distribuado de rimedoj inter homoj klasifikitaj laŭ indikiloj de sociekonomia statuso (enspezo, sociprofesie kategorio ktp.), dum oni devus prijuĝi ilin surbaze de la redistribuado de la rimedoj laŭ la lingvaj regataj de la agantoj. Laŭ *Grin* (RG, p.97) la *enkalkulo de justeco* en la klasifiko de la scenaroj devus rezultigi la retenon de la scenaroj 2 (triopa multlingvismo) aŭ 3 (enkonduko de Esperanto kiel unu el du lernendaj lingvoj).



### Komparo de scenaroj laŭ 'lingvaj privilegiitecoj'

Por almenaŭ iom kvantigi la grandon de (mal)justeco pro malekvilibraj lernŝarĝoj, subpremo de identeco k.s., mi faris formulojn, per kiuj eblas rilatigi la nombrojn de ne-denaske parolantoj de iu lingvo al ĝia nombro da denaske parolantoj, surbaze de la datenoj de la statistika instituto de EU "Eŭrostat" (vd. retejan adreson sub "Notoj", p. 188). Mi enkondukas koeficienton de privilegiiteco por ĉiu lingvo, kiu povas esti kalkulata ne nur por la aktuala lingva hierarkio, sed ankaŭ por la scenaroj 1, 2 kaj 3 kaj eĉ por la kazo ke ekzistus plena multlingveco. Tiu koeficiento kreskas laŭgrade de la privilegiiteco de la lingvo.

Lingvo denaska	lernataj lingvoj			Totalo
	$L_i$ kun parolantaro $l_i$	$L_j$ kun parolantaro $l_j$	aliaj lingvoj	
$L_i$ kun parolantaro $l_i$	0	$\frac{hl_j}{N-l_i} \cdot l_i$	.....	$hl_i$
$L_j$ kun parolantaro $l_j$	$\frac{hl_i}{N-l_j} \cdot l_j$	0	.....	$hl_j$
aliaj lingvoj	.....	.....	.....	.....
Totalo	$h \left( S - \frac{l_i}{N-l_i} \right) \cdot l_i$	$h \left( S - \frac{l_j}{N-l_j} \right) \cdot l_j$	.....	$hN$

Tab. 4: Proporcio multlingvismo, se ĉiu civitano lernus  $h$  fremdajn lingvojn

La stato de plena multlingveco ŝajnas esti plene realigita, se ĉiuj civitanoj en EU lernus saman fiksan nombron  $h$  da fremdaj lingvoj kaj ke ene de ĉiu lingvujo la civitanoj elektus la lernendajn fremdajn lingvojn laŭ proporcio de ilia parolantara amplekso. Tio kondukas al jena tabelo, en kiu

$$\sum_k l_k = N \text{ signas la tutan loĝantaron de EU kaj } S = \sum_k \frac{l_k}{N-l_k}.$$

Kiel koeficienton de privilegiiteco de iu lingvo mi difinas la proporcion de ĝiaj ne-denaske lernintoj (kolumna totalo) al la nombro da

fremdaj lingvoj, kiujn la denaskuloj kune lernis (vica totalo). Tio kondukas al la iom surpriza rezulto, ke 'granda' lingvo estus – almenaŭ laŭ tiu koeficiento  $\left( S - \frac{l_i}{N-l_i} \right)$  – malpli privilegiita ol 'malgranda'

lingvo. Tial mi proponas konsideri alian version de proporcio multlingvismo en kiu ĉiu civitano kun lingvo  $L_i$  lernas  $h \frac{N-l_i}{N}$  fremdajn

lingvojn, kio signifas, ke oni lernas – averaĝe - nombron da lingvoj proporcie al la grandeco de la eksterlingvujo. Tiu versio aperas kiel plej demokrata kaj donas por ĉiuj lingvoj saman koeficienton de privilegiiteco 1. Por lingvo, kiun neniu lernas, la koeficiento de privilegiiteco egalas al 0.

Por neŭtrala lingvo (difinita tiel ke neniu parolas ĝin denaske) aŭ unu domina nacia lingvo, kies parolantoj ne lernas fremdajn lingvojn, la koeficiento estas nefinia.

Helpe de tiu privilegikoefficiento oni povas krei bildon laŭ la scenaroj 1, 2 kaj 3<sup>14</sup> de la atendebla graveco – nombro da lernintoj rilate al nombro da denaskuloj – de la eŭropaj lingvoj kaj kompari ilin.

Tio montras, ke – en la absolute teoria situacio, ke vere ĉiuj loĝantoj de EU kapablus lerni kaj efektive lernus du fremdajn lingvojn – la privilegiitaj lingvoj atingus nombron da parolantoj, kiu superas la

<sup>14</sup> Ni signu la privilegiitajn lingvojn per F, G kaj A kaj la ceterajn lingvojn per  $L_i, L_j, L_k$  ktp. Supozu, ke F havas  $f$  parolantojn, G havas  $g$ , lingvo A havas  $a$  parolantojn kaj la  $j$ -a ne-privilegiita lingvo  $L_j$  havas  $l_j$  parolantojn. Oni nun povas atendi, ke laŭ scenaro 2 la  $l_j$  ne-privilegiitaj parolantoj lernos la lingvojn F, G kaj A en la proporcio  $f:g:a$ . (Mi rimarkis, ke *Grin* egaligas, en scenaro 2, la gravecojn de la franca, la germana kaj la angla lingvoj inter si, ĉefe ĉar la nombroj de iliaj denaske parolantoj ne multe diferencas. Tamen mi preferas eliri de pli akceptebla regulo, ke la graveco de lingvo mezuriĝas laŭ la nombro de ĝiaj denaske parolantoj.)

Ĉar ili lernas po du lingvojn, la nombroj da lernantoj estos respektive  $2f/f+g+a \cdot l_j$ ,  $2g/f+g+a \cdot l_j$  kaj  $2a/f+g+a \cdot l_j$ . La lernlingvoj de la parolantoj de privilegiita lingvo, ekz. G, estos unu alia privilegiita lingvo, ekz. F (por kiu proponos sin  $f/f+g$  lernantoj) aŭ A (por kiu proponos sin  $a/f+g$  lernantoj), kaj unu ne-privilegiita lingvo  $L_i$ , supozeble ankaŭ laŭ proporcio de ties nombro da denaske parolantoj, do kun  $\frac{l_i}{N-p} \cdot g$  lernantoj,

en kio  $P = f+g+a$ . Kun tiuj proporcioj de  $f, g, a$  kaj  $l_i$  oni povas fari tabelon kun lernlingvoj laŭ la kolumnoj kaj denaskaj lingvoj laŭ la vicoj. Ties totaloj donas la kvantojn de fremdulaj lernintoj de F, G, A kaj  $L_i$ .



nombro da denaske parolantoj je elcentaĵo inter 328% (angla: 2x1,64), 324% (franca: 2x1,62) kaj 298% (germana: 2x1,49) (vd. Tab. 5). Ĉu tio estas dezirinda? Ĉar *Grin* skribas (RG, p. 8) ankaŭ: "Tiu 2-a scenaro tamen entenas riskojn malstabiligi kaj erodi favore al la angla, kio donas argumenton favore al la 3-a scenaro. Tamen, se la akompanaj aranĝoj povas daŭre garantii multlingvismon, la dua scenaro povas esti longtempa strategio."

	angla	franca	germana	pola	hispana	itala	aliaj lingvoj
Scenaro 1	6,20	0,98	0,86	1,07	1,06	1,01	inter 1,13 kaj 1,17
Scenaro 2	1,64	1,62	1,49	0,47	0,47	0,47	0,47
Scenaro 3	0,49	0,48	0,44	0,52	0,52	0,50	inter 0,55 kaj -0,57

Tab. 5: Kelkaj rimarkindaj privilegiitaj koeficientoj

Por enfokusigi la demandon mi kreis diagramon (Fig.4, p.182) por la ses lingvoj, nomitaj ĉi-supre, inkluzive de unu ekzempleca lingvo 'malgranda', havanta supozate dek milionojn da denaske parolantoj. La skalo estas logaritma por akcepti la fakton, ke la nombro da parolantoj de iu lingvo ne povas ne evolui proporcie al la komenca parolantaro. Pripensadante la proporcion kontraŭbaton, kiun la neprivilegiitaj lingvoj (pola, hispana, itala kaj 'malgrandaj') suferus ĉe realigo de scenaro simila al triopa multlingvismo, oni komprenas, ke tiuj ŝtatoj ne favoras tian tipon de multlingvismo, kompare kun la hodiaŭa stato de dominado de la angla.

Ĉu tiuj ŝtatoj vere pretus intensigi siajn instruadajn programojn de fremdaj lingvoj al du devigaj okcident-eŭropaj lingvoj, dum aktuale ili tendencas al akceptado de unu, la angla? Ĉar tio ankaŭ signifas, ke ili havos aferon kun tri gravaj lingvoj, kiuj – supozeble malpli celtrafe ol la angla – prizorgos la komunikadon en la institutoj de EU kaj kiuj eble forkonkuros ilian inkliniĝon orientiĝi al najbaraj same malgrandaj lingvoj. Ĉu ili konscios en sama maniero kiel multaj honestaj eŭropanoj, ke la pligrandiĝanta dependeco al la angla estos hipoteko pri nia politika sendependeco?

Ĉion pesinte, mi opinias, ke scenaro 2 estas preferinda al la hodiaŭa situacio, kiu estas alproksimiĝanta al scenaro 1. Franclingvanoj, germanlingvanoj kaj anglalingvanoj<sup>(6)</sup>, kiuj ja konsistigas proksimume

48,5 % de la eŭropa popolo, estus lingve samrajtaj inter si kaj formus firman bazon por paco kaj progresigo de la Eŭropa kulturo kaj prospero.

Tial mi deklaras min 'provizora' subtenanto de tiu scenaro 2 de triopa multlingvismo, je kondiĉo, ke tiu parta samrajteco estos akompanata de forta subtenado de malprivilegiitaj lingvoj.

### Tra rekono de egaleco al oficialigo de Esperanto

Kial mi spezas tiom da atento al tiu parta multlingvismo, dum mi estas esperantisto kaj *Grin* mem kalkulis, ke "en tempodaŭro de unu generacio, maljustaj transpagoj de miliardoj da eŭroj povos malaperi kaj neta ŝparajo de ĉirkaŭ 25 miliardoj da eŭroj jare estas ebla por la tuto de Eŭropa Unio"?

Mi atentigas denove, ke la registaroj devos unue interkonsenti pri reglamentado de la laborlingvoj en la Eŭropaj institucioj kaj – ankorau pli malfacile – ili devos fari ampleksan traktaton pri siaj naciaj edukaj politikoj, dum tiu eduka politiko tute ne refalas sub la kompetenton de Eŭropa Unio kaj verŝajne neniam refalos!

Nur tra la pordo de rekono de la egaleco de ĉiuj lingvoj ni povos atingi oficialigon de Esperanto fare de Eŭropa Unio. Ni bezonas la helpon de sciencistoj, kiuj atentigas la politikistojn pri la malekvilibraj ekonomiaj konsekvencoj kaj pri la maldistributado de la edukŝarĝoj inter la parolantoj de diversaj lingvoj. La Esperanta movado saĝus plenkore kaj plenenergie subtenante la multlingvismon de Eŭropo, eĉ se tiu entenus, pro praktikaj kaŭzoj, privilegiadon de nur tri grandaj lingvoj.

Cetere, mi bedaŭras la maleneston de iu slava lingvo inter la privilegiitaj lingvoj. Ili plej multe suferas pro la altrudo de la angla. *Grin* pledas ankaŭ por pozitiva diskriminacio de la malgrandaj lingvoj per kunordigita agado de la registaroj.

Tia politiko estus logika konsekvenco de la oficiala politiko de Eŭropa Unio por multlingvismo. Ĝuste en tiuj orient-eŭropaj landoj ni eble havas ŝancon por partopreni politikan diskurson pri maljusteco inter lingvoj kaj varbi por rekono de Esperanto fare de Eŭropa Unio.



**Notoj**

- (1): vd. [http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport\\_Grin.pdf](http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport_Grin.pdf)  
 (2): vd. [http://www.lingvo.org/grin/raporto\\_grin\\_XX.pdf](http://www.lingvo.org/grin/raporto_grin_XX.pdf). Substituigu respektive cz, pt, nl aŭ Eo al XX, laŭ la dezirata lingvo  
 (3): [www.lingvo.org](http://www.lingvo.org)  
 (4): [edukado.net](http://edukado.net) “Tago de Lingvoj”  
 (5): vd. [www.ecml.at/edl/default.asp?t=materials](http://www.ecml.at/edl/default.asp?t=materials)  
 (6): legu <http://www.liberafolio.org/2006/ghenuloj>  
 (7): <http://epp.eurostat.ec.europa.eu>

**Referencoj**

- AMMON U. & N. DITTMAR (2006): Sociolinguistics/Sociolinguistik, Vol 3  
 GRIN François (2005). Haut Conseil de l'Evolution de l'Ecole, Rapport n-ro 9  
 OSTWALD Wilhelm (1910). *Die Forderung des Tages*, Leipzig. Akademische Verlagsgesellschaft. Citita de Henry Jacob, 1943. Otto Jespersen. *His work for an International Auxiliary Language*. Essex: International Language (Ido) Society of Great Britain, 30  
 PHILLIPSON (2003). “English-only Europe?”, 2003, tradukita kiel “Ĉu nur-angla Eŭropo?”, Rotterdam UEA, 2004, p. 82  
 PLOQUIN Françoise (2005). Le Monde Diplomatique, jan. 2005, p.22-23  
 VAN PARLIS Philippe. “L'anglais lingua franca de l'Union européenne: impératif de solidarité, injustice distributive, facteur de déclin?” en: *Économie publique* 15(5), 13-32  
 VERGARA J.A. (2006a). La ŝanĝiganta interrilato scienco-socio: koncernoj por ISAE en la 21-a jarcento, *Scienca Revuo*, 57, 127-140  
 VERGARA J.A. (2006b). Scienco, demokratio kaj Esperanto: Ideoj antaŭ la centjariĝo de ISAE. *Esperanto* (UEA), 99, 243-251

**Adreso de la aŭtoro**

Johan H. DERKS  
 Rietgors 40  
 NL – 8271 GH IJsselmuiden / NEDERLANDO  
 <derks.esp@tiscali.nl>

**Priaŭtora informo**

La aŭtoro studis teorion fizikon kaj sociologion en *Utrecht* / Nederlando, instruis mezlernejan matematikon kaj statistikon en Ugando, Kamerunio kaj Nederlando. Li estis sekretario kaj kasisto de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kaj kuntradukinto de la raporto *Grin* al la nederlanda lingvo kaj al Esperanto.

**Pri nacieco kaj sennacieco**

Mira MAKIVIĆ

Pripensante la nomon de “Sennacieca Asocio Tutmonda”, mi neeviteble renkontas la demandon: Kio signifas “Sennacieca”? Mi konas diversajn teoriojn pri la ekesto de nacioj kaj sennacieco. Jen, mi listigas kelkajn:

1. Spiritualistoj opinias, ke la ekesto de nacio estas la ŝtato kiel unuiganta komunumo, en kiu oni formas nacion (tiel opinias *Hegel* kaj *Glumpović*);
2. Pozitivistoj parolas pri la nacio kiel pri statika areo de sama lingvo, sama deveno kaj samaj moroj;
3. Vulgaraj materialistoj diras, ke la nacion faras la idoj de antaŭuloj, kiuj de unu generacio al la alia transdonas siajn propecojn;
4. Subjektive-psifologia teorio asertas, ke la nacio kaj la nacieco ekzistas en la sento de individuoj, ke ili estas anoj de iu nacio;
5. Aŭstriaj demokratoj perceptas la nacion kiel kategorion de “kultura afero”;
6. Marksistoj traktas la nacion kiel formon de homa komunumo, kiu estas ligita al iu historia periodo, kaj tial ĝi estas influita de la evoluo de produktantaj fortoj kaj de la socia divido de la laboro. Marksistoj neas la ekziston de pra-nacio ĉar ili opinias, ke nacieco estas ligita al la ekesto de kapitalisma socia ordo (tiel indikas *Friedrich Engels* en “Deveno de la Familio”).